De vi, ĉiuj membroj de ISAE, mi petas kunhelpon, ke ni, harmonie kun-iĝante, progresigu aktivadon de nia asocio.

Sincere salutas

*Sin'itirô Kawamura**


**Bibliografio**

1959

*Sin'itirô Kawamura – Teiiti Narasaki, – Ryozo Kusuhara – Takakatu Satô:* Studoj pri la karbonhidratoj de la semo de *Vicia faba*. IV. Eltrovo de ribozo en hidrolizato de hemi-celulozo de faboj. – *Kagawa Daigaku Nôgakubu Gakuzyutu Hôkoku, 8, 201-211.* – *Chemi-cal Abstracts 53 (1959), 9377h.*

1959

*S.K.:* Diverseco de monosakaridoj konsistigantaj hemicelulozojn. – Sama periodaĵo, *11, 215-233.* – *Chemical Abstracts, 54 (1319), 13197i.*

1963

*S.K.:* Hidrolizo de pektino per acido. – Sama periodaĵo, *15, 22-28.* – *Chemical Abstracts, 60 (1964), 5611g.*

1970.

*Sin'itirô Kawamura – Yukihiko Kumano – Sumizô Tanusi:* Ŝanĝiĝoj de sakarozo, meli-biozo, rafinozo, kaj stakiozo laŭ varmigo aŭ acidigo sen aŭ kun glicino. – Sama periodaĵo, *21, 114-121.* – *Chemical Abstracts, 77 (1972), 114736.*

1973

*S.K.:* Ekzamenado de periodaĵoj en la kampo de aplikata biokemio. II. Fremdlandaj (ne-japanaj) periodaĵoj pri kemio kaj kemia teknologio de manĝaĵoj. – Sama periodaĵo, *24, 191-198.*

1958

*S.K.:* Sukeroj de kelkaj japanaj legumenacoj. – SCIENCAJ STUDOJ, 173-180, ISAE, Kopenhago. – *Chemical Abstracts, 52 (1958), 20430b.*

1963

*S.K.:* Studoj pri ameloj de legumenoj (parto de doktortezo). – *Kagawa Daigaku Nôgakubu Kiyô, 14, 1-49.* – *Chemical Abstracts, 59 (1963), 1959g.*

1964

*S.K.:* Japanaj manĝaĵoj de nutrokemia vidpunkto. – SCIENCA KAJ TENKIKA RONDO, 4, 55-63, Montevideo.

1971

*S.K.:* Kiu eltrovis vitaminon? – LA MOVADO, 247-250, *Osaka.*

1974

*S.K.:* Fundamentaj konceptoj en kemio. – Someraj Universitataj Kursoj, KT-7, 78 p. – *Chemical Abstracts, 82 (1975), 145065.*

*S.K.:* Informado kaj dokumentado pri kemio. – Sama eldonejo, KT-17, 43 p. – *Chemical Abstracts, 83 (1975), 8311.*

*S.K.:* Enkonduko en organikan kaj biologian kemion. – Sama eldonejo, KT-11, 89 p. – *Chemical Abstracts, 82 (1975), 134122.*


* d-ro pri agrikulturscienco, emerita profesoro de Ŝtata *Kagawa*-Universitato, profesoro pri nutra ĥemio de *Meizen*-Kolegio, *TAKAMATU*, Japanio.




*S.K.:* Kemio kaj biokemio de karbonhidratoj. – Sama eldonejo, KT-12, 47 p. – *Chemical Abstracts, 82 (1975), 134123.*

*S.K.:* Kemio de manĝaĵoj, ĉefe novaj proteinaj. – Sama eldonejo, KT-16, 91 p. – *Chemical Abstracts, 82 (1975), 153825.* – *Food Sci. Technol. Abstr., 6(12-1974), A567.*

1976

*S.K.:* Originoj de la vivo de biokemiaj vidpunktoj. – Sama eldonejo, KJ-3, 62 p.


Notoj:
La listigo baziĝas sur ĥronologia ordo; tamen, la unuaj kvin estas disertaĵoj aperintaj en teĥnika bulteno de mia antaŭa laborejo. Koncerne *Chemical Abstracts:* Estas necese, ke disertaĵoj estu referencataj en tiel nomata sekundara periodaĵo, por esti pli facile trovataj. Mi havas rilaton kun *Chemical Abstracts* kaj klopodos, ke ĥemiaj artikoloj de SCIENCA REVUO estu regule resumataj en tiu ĉi anglalingva periodaĵo. Mi provos kontakti ankaŭ kun *Biological Abstracts* tiurilate.

## STATUTO DE INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

1. NOMO

La nomo de l' asocio estas INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA, simbole ISAE.

2. CELO

ISAE celas apliki kaj fine akceptigi Esperanton kiel oficialan lingvon en la sfero scienca-teĥnika.

3. MEMBRECO, KOTIZOJ

3.1. **Individua membro** povas esti ĉiu sciencisto aŭ teĥnikisto, profesia aŭ amatora, kun scienca reputacio, kiu konsentas pri la celo de ISAE kaj pagas la kotizon.

3.2. Internaciaj organizoj (faka, profesora, studenta) povas aliĝi **kolektive** kiel sekcioj de ISAE, por komune efektivigi la celon de l' asocio.

3.3. Kiel **honoran membron**, jarkunveno povas akcepti personon, kiu faris gravan servon al ISAE aŭ kiu esence kontribuis al atingo de ĝia celo. La decido devas esti unuanima.

3.4. **Eksiĝo** el ISAE devas esti anoncita skribe ĝis la fino de novembro, alie oni restas membro dum la venonta jaro. L' estraro **eksigas** membron, kiu – malgraŭ ĝustatempa averto – jarfine ankoraŭ ŝuldas kotizon por la kuranta jaro. Jarkunveno povas per du-triona plimulto da ĉeestantoj eksigi membron, kiu evidente kontraŭagas la celon de ISAE aŭ malutilas al ĝi.

3.5. L' estraro fiksas asocian **kotizon** de individua membro. La sekcioj, filioj, komisionoj k.t.p. mem decidas pri sia financado, sed ĉiu ilia ano nepre devas pagi la kotizon asocian, en kiu inkludiĝas abonkotizo por la oficiala organo de ISAE.

3.6. **Subtenanto** de ISAE pagas minimume duoblan kotizon de individua membro, de kiu li distingas sin pro manko de iuj kondiĉoj, fiksitaj sub 3.1. Li ricevadas la oficialan organon.

3.7. Oni povas pagi la membrokotizon ankaŭ **por pluraj jaroj aŭ por la tuta vivo** tiel, ke 5 kotizoj validas 6 jarojn, 8 kotizoj validas 10 jarojn, 15 kotizoj validas 20 jarojn kaj (30 - n/5) kotizoj (kie "n" estas jar-aĝo de la paganta membro) validas dum la tuta vivo.

3.8. **Honoraj membroj** ne bezonas pagi kotizon.

3.9. La kotizo estas antaŭpagenda.

4. GVIDADO

ISAE estas gvidata de **komitato** kaj de **estraro.**

4.1. La komitato konsistas el landaj delegitoj, el funkciuloj de landaj filioj kaj de fakaj sekcioj.

4.1.1. **Landa delegito.** L' estraro klopodas trovi en ĉiu lando delegiton, reprezentanton de ISAE. Li varbas membrojn, enkasigas kotizojn kaj transpagas ilin al la sekretario-kasisto (se ne ekzistas aliaj alternativoj). Li sendas ĉiujare raporton pri sia agado al la ĝenerala sekretario. Por povi pli efike labori, li klopodas fondi landan filion. Se en iu lando fondiĝas scienca societo esperantista, la delegito devas zorgi, ke ĝia statuto ne kontraŭdiru la statuton de ISAE kaj ke la societo aliĝu kiel landa filio de ISAE. Escepte, landa delegito ne bezonas esti komitatano.

4.1.2. **Landa filio.** En la lando, kie ekzistas pli ol 5 individuaj membroj, povas fondiĝi landa filio. Havante 6-20 membrojn, landa filio estas reprezentata en la komitato de ISAE sole de la landa delegito; 21-50 membroj elektas krom li duan komitatanon, 51-100 membroj elektas krom li 2 komitatanojn, 101-200 membroj 3, pli ol 200 membroj 4.

4.1.3. **Faka (profesora, studenta) sekcio** elektas komitatanojn sammaniere, sed la rolon de la landa delegito havas en ĝi la gvidanto de la sekcio.

4.1.4. La **redaktoro** de la oficiala organo kaj gvidantoj de centroj aŭ fak-komisionoj fariĝas komitatanoj.

4.1.5. La komitato rajtas alelekti maksimume kvin pliajn komitatanojn.

4.1.6. La komitatanoj estas elektataj por 5 jaroj.

4.2. **L' estraro** estas elektata de kaj el la komitatanoj per skriba voĉdono en la fino de ĉiu kvina jaro. Ĝi konsistas el prezidanto, 2 vicprezidantoj, ĝenerala sekretario, sekretario-kasisto kaj 6 aliaj estraranoj. Ĉiuj estas reelekteblaj.

4.2.1 La **prezidanto** estas la ĉefa reprezentanto de l'asocio kaj gvidanto de la jarkunveno.

4.2.2. En okazo de lia morto, eksiĝo aŭ foresto el jarkunveno, lian taskon transprenas la pli malnova (se ambaŭ estas same malnovaj, la pli aĝa) **vicprezidanto.**

4.2.3. La **ĝenerala sekretario** gvidas ĉiutagan funkciadon de ISAE, organizas elektojn de la komitato, estraro, referendumojn kaj prizorgas ceterajn skriblaborojn.

4.2.4. La **sekretario-kasisto** enkasigas la kotizojn, tenas la librojn kaj submetas ilin al revizio fare de du revizoroj, ĉiujare elektataj de l' estraro. Li tenas la membrokartotekon. Okaze, ke la ĝenerala sekretario longtempe malsanas, forestas aŭ mortis, li fariĝas lia anstataŭanto.

5. FAKAJ SEKCIOJ

La plej grava tasko de faka sekcio estas, kontaktigi kaj kunlaborigi neesperantistajn fakinstituciojn kun ISAE kaj tiel prepari grundon por oficiala akcepto de Esperanto en la scienca-teĥnika sfero. Faka sekcio de ISAE klopodas, aperigi sian periodaĵon (cirkuleron, bultenon, revuon aŭ kolekton de originalaj verkoj), aŭ almenaŭ prizorgi materialon por specialigitaj numeroj de l' oficiala organo asocia. Laŭeble ĝi organizas simpoziojn aŭ partoprenas kiel memstara sekcio en kadro de neesperantistaj sciencaj kongresoj. Grava estas ankaŭ terminologia kunlaboro de la sekcio kun koncerna departemento de Terminologia Centro de ISAE.

6. TERMINOLOGIA CENTRO DE ISAE

Terminologia Centro estas fakte komuna organo de ISAE kaj AE (Akademio de Esperanto). Ties direktoron elektas la estraro de ISAE. La elekto ne validas sen aprobo de AE. Ricevinte koncernan aprobon, ISAE rekomendas al AE, ke ĝi organizu lian elekton por akademiano (se li jam ne estas tia). La centro dividiĝas en departementojn, kies gvidantoj funkcias samtempe kiel la vicdirektoroj de la centro. Ilin elektas l' estraro de ISAE; ke ili estu membroj de AE ne necesas, sed estas rekomendinde. La centro organizas ellaboradon de terminaroj en kontakto kun la fakaj sekcioj de ISAE.



7. ALIAJ CENTROJ, KOMISIONOJ K.T.P.

L' estraro povas starigi pliajn centrojn aŭ komisionojn, por ke estu prilaborataj specialaj kampoj aŭ plenumataj diversaj servoj.

8. KUNVENOJ, REFERENDUMO

Jarkunveno okazas en la kadro de Universala Kongreso aŭ de internacia scienca renkontiĝo, ankaŭ neesperantista (kongreso, konferenco, simpozio). Kunvoko al la jarkunveno aperu en la oficiala organo minimume 40 tagojn antaŭe kaj ĝi enhavu liston de aferoj pritraktotaj: jarraporto de l' estraro, jarkonto kaj bilanco por la pasinta jaro, budĝeto por la venonta jaro kaj aliaj demandoj. Se neniu estrarano povas ĉeesti la jarkunvenon, l' estraro komisias al alia membro, se eble komitatano, gvidi la kunvenon. La jarkunveno estas decidpova, sed dum 3 monatoj post publikigo de la decidoj, ĉiu membro rajtas postuli referendumon, kiu estas farata, se almenaŭ 10 membroj skribe postulas tion.

9. ORGANO

La komitato difinas, kiu periodaĵo estu oficiala organo asocia. La oficiala organo aperigas ĉiujn informojn pri la laboro de ISAE, de ties fakaj sekcioj, centroj, komisionoj, filioj. Se temas pri sendependa revuo, l' estraro nomas, interkonsente kun ĝia eldonisto, la redaktoron kaj reprezentanton de l' estraro, kiuj komune kun la reprezentanto eldonista zorgas pri eldonado de la revuo. La komitato povas permesi ankaŭ al organo de faka sekcio, porti la titolon "organo de ISAE". Tia organo devas doni favoran abonprezon al ĉiuj abonintoj pere de ISAE.

10. STATUTŜANĜO, MALFONDO

Por statutŝanĝo estas necesaj referendumo kaj aprobo per dutriona plimulto de la respondoj. Malfondon de ISAE povas decidi jarkunveno per kvarkvinona plimulto de la ĉeestantoj. En okazo de malfondo, la havaĵo de ISAE estu uzata, se eble, por disvastigo de Esperanto inter sciencistoj kaj teĥnikistoj.

(Ĉi tiu statuto estis ellaborita en 1975 kaj per referendumo aprobita oktobre en 1977.)

**Amendoj por statut-modifo**

Oni antaŭvidas, ke la nuna statuto povus validi ĝis la fino de 1985.

Por bone prepari statut-version venontan, necesas, ke ĝustatempe kolektiĝu proponoj pri eventuala modifado. Fakte jam okaze de la ĵusa referendumo alvenis kelkaj kritikaj glosoj. Ĉar la referendumo postulas almenaŭ unu jaron da streĉa organiza laboro, oni devas la limdaton por finredakto de la statut-teksto fiksi ĉirkaŭ mezo de 1984.

La ĉefa celo de statut-ŝanĝoj estu modernigado de ISAE adapte al la rapide evoluantaj scienco kaj teĥniko.

Ĉiuj iniciatoj koncernantaj la statuton, estu adresataj al la ĝenerala sekretario de ISAE.